

NI SALUTAS LA 1-AN ĈEĤOSL. TUTŜTATAN SPARTAKIADON!

Stan. Kamarýt: Malujunulo alparolas junularon.

Nia generacio formortas. Ni deklamu plej emfaze la faman Pitlík-sloganon, ke Esperanto junigas, tamen la fino estos silento.

En la unua jardeko de tiu ĉi jarcento ni estis la plej densa tavolo, kiu tenis la movadon. Ĝi estis aĝtavolo maldika. Certe ne dek jarojn. Plej probable kvin jarojn proksimume. La pli maljunaj esp-istoj estis raraj, la pli junaj ankoraŭ neuzeblaj. Ĝi estas fenomeno internacia. Dum sencelaj netaj promenadoj en 1906/8 mi kaj Bouška ofte diskutadis pri tio. Ĝi ne estis konstato kuraĝiga.

Tamen post la milito venadis homoj el pluaj jarintervaloj. Ni jam povas fieri pri eminentaj kvindek- kaj kvardekjaruloj, ni nomu por ekzemplo Ŝustr, Staněk, Echtner, Vondroušek, Heikenwälder, Rosa, Slanina, Malík, Kožený, Izák, Vítek, Šolc, Špůr, Slaný kaj aliaj.

Sed nur tiam, kiam ni perdis eblecojn presi, aperis subite aĝtavolo simila, kiel estis ian la nia. Kompakta, konscia junularo. Esperantistoj estas en ĝi pli oftaj ol en ceteraj aĝtavoloj. En nia popoldemokratia sistemo, kie junularo estas organizata en tia ĉi kvalito, ĝi estas pli rimarkebla, same kiel en Polujo, Hungario, Bulgarujo. Sed ankaŭ en aliaj landoj simila sperto estas konstatebla. Ĉie aperas junulara tavolo klopodanta memstare per propraj metodoj labori por Esperanto. Kaj por organizata Paco.

Tiu analogaj junularo estu salutita de maljunulo! Kaj ĝi aŭdu kelkajn vortojn el lia malforgesol! Ankaŭ ni ne estis malbona junularo. Du malvirtojn ni posedis: Ni tro plaĉis al ni mem.

Ni tro skeptikis pri ni mem.

Tio estis grandaj pekoj. Tio estis agrablaj pekoj. Estis bele kuŝi surventre kaj moki burĝaĉon. Estis agrable dubi pri ebleco de grandaj faroj. Sed ni posedis tiam ankaŭ kelkajn virtojn. Antaŭ ĉio mi nomus batalemon. Ĝi apartenas al normala ekipo de ĉia junularo. Ĉe nuna junularo mi vidas ĝin en kvanto konvena. Kaj ĉiujn ceterajn virtojn junecajn: Fidon al estonto. Kredon, ke homa strebado havas sencon. Konvinkon, ke iradon de homaj aferoj ni povas turni laŭ direkto de ni volata. Sed ke por ĉio ajn batalo estas necesa, nenio estas ricevata donace. Tion ni kredis. Ne ĉiam ni sukcesis. Sed tamen ni transdonas al la juna generacio Esperanton en formo multe pli progresinta ol ni akceptis ĝin, kaj elprovidintan en tre diversaj situacioj, ofte nefavoraj.

Junaj geamikoj, transprenantaj de ni la torĉon, malimitu niajn erarojn! Vi prenas torĉon modestan kun flameto bezonanta prizorgon, sed kiu ne rajtas estingiĝi. Akceptu ĝin kun tia modesteco, kun kiu ni ĝin transdonas. Ne grandaj vortoj faras grandajn farojn. Sed firmaj volo kaj konvinko.

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenadas ĉiumerkrede en Praha II, Ve Smečkách 26 je la 20a horo.

Dum julio kaj aŭgusto amikaj klubvesperoj sen speciale starigitaj programoj.

PARTOPRENANTOJ DE LA 1-A TUTŜTATA SPARTAKIADO kaj VIZITANTOJ DE PRAHA!

Nia klubo atenda vian viziton merkrede la 6an de julio kaj preparas po rvi amikan verdan vesperon!

Programaj klubvesperoj komencas denove regule depost la 1a de septembro laŭ la anonco en nia proksima Bulteno.

GEEDZIĜO. Kiam nia pasinta numero estis finredaktita, atingis nin la sciigo en Esperanto anoncata: Sonja Zedníková kaj Milan Strouhal sciigas, ke la 7an de majo 1955 je 10,30 ĉe Distrikta nacia komitato en Praha 7 – Holešovice, Veletržní str. estiĝas nova edza paro Milan kaj Sonja Zedníkovi. Kvankam malfrue, same sincere ni esprimas al niaj klubmembroj niajn bondezirojn.

-

Morto de samideanino Anna HROMADOVÁ. Tute ne atendite ni eksciis, ke la 28an de majo 1955 mortis tre bona virino kaj sincera esperantistino Anna Hromadová, edzino de kontata Rudolf Hromada. En vere impona nombro niaj anoj venis por esprimi al si sian estimon! La edzo kaj la cetera familio akceptu nian profundan kondolencon!

-

La 4an de majo 76jara mortis en Brno Dro Josef Barvíř. Al la ideo de Esperanto li dediĉis 56 jarojn de sia vivo. Pasintjare ni rememoris lian 75 jariĝon en nia Bulteno.

-

KONFERENCO DE SLOVAKIAJ ESPERANTISTOJ – AKTIVULOJ.

Dimanĉe la 12an de junio en impona salono de Slovaka muzeo en Martin okazis la konferenco de slovakiaj esperantistoj. La konferencon partoprenis 26 geesperantistoj, kiuj transdonis raportojn pri la stato de nia movado en Bratislava, Galanta, Košice, Martin, Nové Zámky, Poprad, Prakovce, Sereď, Svit, Trřenĉín, Trnava, Zvolen, Źilina. Raporton pri la nuntempa stato de la movado en ĈSR prezentis membro de EK Praha Josef Vítek, komisiita partopreni la konferencon. Estis decidite en proksima tempo sendi informan cirkuleron al ĉiuj adresoj de estintaj slovakiaj aktivuloj kaj varbi ilin por nova laboro, ĉar plej verŝajne neinformeco kaŭzis ilian stagnon. Ankaŭ estis aprobita rezolucio de slovakiaj esperantistoj por la konferenco de esperantistoj-pacdefendantoj en Otrokovice kaj rekomendita la plej granda ĉeesto. Starigo de slovakia sekcio de TKKE ne okazis, ĉar ne partoprenis ĉiuj kandidatoj. Fine estis interkonsentite aranĝi ĉiun kvaronjaron laborkonferencon por vigligi la movadon en la aranĝanta regiono. Tial la aŭgusta rendezuo kaj konferenco okazos en Svit aŭ en Poprad kaj tiu de aŭtuno de Źilina. Sub gvido de Ed. V. Tvarořek la konferenco donis la bildon de perfekta laborkunsido. Domaĝe nur, ke ĉeestis malmultaj partoprenantoj, kvankam la 83jara samideano Kremer el Košice devis pasigi 500 km en vagonaro volinte ĉeesti la konferencon.

-jelĉ-

-

Kiel atingas nin sciigoj de niaj gesamideanoj, someraj kursaroj promesas esti agrabla renkontejo de adeptoj de nia movado. Speciale Somera Kolegio de Esperanto en Doksy, nunjare jubileanta sian 10jaran ekziston havas imponan aranĝankvadron: protekton akceptis Distrikta Nacia Komitato en Doksy kaj Domo de kulturo en Doksy kaj aranĝanto estas Esperantista Klubo en Praha.

-

PROGRAM CELOSTÁTNÍ KONFERENCE ESPERANTISTŮ – OBRÁNCŮ MÍRU V OTROKOVICÍCH
ve dnech 6. 7. – 11. 7. 1955

6. 7. středa:	14 – 18	Porada Přípravného výboru /projednání org. záležitostí/	řídí s. Kožený
7. 7. čtvrtek:	8 – 12	Vítání účastníků Tutštata představiteli ZK-ROH	s. Evjáková
		Beseda se zahraničními hosty	s. Burda
	12 – 13,30	oběd	
	15 – 18	Jaké úkoly má Esperanto ve světovém hnutí Obránců mírů – diskuse	s. p. Macek
	20 – 23	Seznamovací večer zahájený otevřením Esperantské výstavy	s. Kožený
8. 7. pátek:	9 – 10,30	Marxismus v jazykovědě	s. Kožený
	10,30 – 11,30	UNESCO	s. Rudolf
	11,30 – 12,00	diskuse	
	12 – 13,30	oběd	
	15 – 18	Porada vedoucích kroužků Odborné schůzky dle zájmu	s. Omelka
	20 – 22	Skandinávie /přednáška, barevné filmy/	s. Vítek
9. 7. sobota:	9 – 12	Esperanto v literatuře /tvorba původní i přeložená/	s. odborníci
	12 – 13,30	oběd	
	14 – 16	Esperanto v literatuře /pokrač./	s. Rudolf
	16 – 19	Zasedání JUNULARA	s. Kuzník
	20,30 – 22,30	Umělecký večer souboru Verda Ĉaro de Julio Baghy	s. Seemann
10. 7. neděle:	7,30 – 8,30	Mírová mše s esp. kázáním /pro zájemce/	s. p. Macek
	8,30 – 8,50	fotografování	s. Evjáková
	9 – 9,05	zahájení a uvítání	s. Evjáková
	9,05 – 9,10	předání dalšího řízení konference	s. Rudolf
	9,10 – 9,40	rozvedení prac. plánu v souladu s mírovým hnutím	s. Burda
	9,40 – 10,10	Esperanto prostředníkem mezi národy	s. Vítek
	10,10 – 10,30	s. Jar. Sedláček, poslanec NS.	
	10,30 – 10,40	zdravice zástupce ZK	
	10,40 – 11,30	stanovení generální linie volba TKKE dle přečtené kandidátky	
	11,30 – 11,50	přečtení došlých i odeslaných pozdravných přepisů /s. Matušová/	
	11,50 – 12,20	pozdravy zahrani. delegátů	
	12,20 – 12,40	zhodnocení /slovenský zástupce/	
	12,45 – 14	oběd	
	14 – 16	úvod k zahájení diskuse, zpráva zást. Junulara jako první diskusní příspěvek /s. Kuzník/ - diskuse.	
	16 – 16,20	závěr – s. Omelka	
	16,20 – 16,30	hymny	
11. 7. pondělí:		při dostatečném počtu zájemců zájezd na zámeček Lešná.	

Sleva na dráze 50%. Přihlášky a 10 Kčs zašlete do 25/6/1955
s. Fan M a t u š o v á, Krátká č. 812, Otrokovice.

ESPERANTSKÝ KLUB PRAHA pořádá pro své členy autobusový zájezd za Kčs 45 na sobotu 9.7. a neděli 10.7. Odjezd z Prahy v sobotu ve 2 hod. ráno, návrat v neděli v noci. Urychleně se přihlaste. s. A. Bárachová, Sokolská 17, Praha II.

ĜOJIGAJ SCIIGOJ EL SOVETUNIO. Laŭ pluraj signoj el la lasta tempo ni povas kredi, ke la decidantaj aŭtoritatoj en Sovetunio ŝanĝas sian vidpunkton koncerne Esperanton. Bulgara Esperanto-Kooperativo en Sofiaricevis el Moskvo jenan leteron de la 5-a de aprilo 1955:

Karaj kamaradoj! Mi estas tre dankema al vi, se vi sendus al mi katalogon de esperanta literaturo. Kiun mi povus mendi de vi kaj ankaŭ komuniku, ĉu estas eldonata nun en Bulgario iu Esperanto-revuo kaj kiuj estas la abonkondiĉoj por ĝi. Mi estas supera science laboranto de lingvistika instituto en Sovet-Unia Scienca Akademio kaj por mia laboro estus grave ricevi regulan informadon pri Esperanto-movado. Post via respondo mi penos mendi per Scienca Akademio la revuon kaj ian Esperanto-literaturon de vi. Samtempe mi sendas al vi ekzempleron de nia revuo „Problemo de lingvoscienco“ kies respondeca sekretario mi estas. Eble ĝi prezentos al vi ion interesan. Kun kamaradeca saluto E. Bokarev, Moskvo 1919, Volhonka 18/2, Institut Jazikoznaniija /Lingvosciencia Instituto/.

Similajn ĝojigajn informojn sendis lastatempe plurfoje al ni membro de EK Praha s-ano Elio Kiselev el Tula, kiu regule ricevadas nian Bultenon.

Se la evoluo daŭros en tiu ĉi direkto, ni observos sendube baldaŭ novan ekmarŝon de Esperanto en la granda Sovetunio. Kaj atendebla ests favora influo ankaŭ al la Esperanto-movado en nia lando. Preparu vin ĉiuj por nova intensa laboro!

ESPERANTO-RESUO EN ĈEĤA VERKO. Pri Jan Rokitansky el Hradec Králové, kiun agnoskas la tutmonda science kiel fondinton de moderna patologia anatomio kaj de kies naskiĝo pasis en 1954 cent kvindek jaroj, eldonis Dům osvěty /Domo de la kulturo/ en kunlaboro kun Vlastivědný kroužek /Scienca rondeto por loka esploro/ en Hradec Králové valoran kaj plaĉan verkon, kiu informas funde pri tiu ĉi fama viro. La libro enhavas resumojn rusan, anglan, francan kaj germanan, en kiuj enestas riĉa kvanto da lingvaj eraroj. Antaŭ ekspedo de la verko enmetis la eldonistoj bonan resumon en Esperanto, verkitan de Zdeněk Hršel. La jubileon de Rokitanský festis la registaro de Aŭstrio, kie la fama kuracisto laboris, per speciala poŝtmarko. La libro kun E-resumo estas mendebla por 7 Kčs ĉe s-ano Zdeněk Hršel, Na Špici 103, Hradec Králové II.

WOLKER EN JAPANA RADIO. Radiostacio en Osaka disaŭdigis la belan rakonton Pri kamentubisto de Jiří Wolker. En japanan lingvon ĝin tradukis laŭ la esperanta teksto en Ĉeĥoslovaka Antologio nia amiko Yasutaro Nozima. Ni informis jam niajn legantojn, ke li jam antaŭe publikigis tiun rakonton en japana revuo.

VOJTĚCH RAKOUS EN CEYLON. Sunday Times of Ceylon aperanta en Colombo, reprenis la 27-an de marto tradukon de rakonto „Pri homo, kiu ne sciis, kiam li naskiĝis“. En la enkonduko parolas la tradukinto R.Raven-Hart laŭde pri Esperanto kaj pri Ĉeĥoslovaka Antologio, kie li la rakonton trovis.

OCENĚNÍ VÝZNAMU ESPERANTA V SOVĚTSKÉM SVAZU. Národní komisariát pošt a telegrafů Sovětského svazu hovoří v dopise z 28. listopadu 1927, jež řídil na skupinu esperantistů z 12 zemí, kteří přijeli do Moskvy k oslavě desetiletí Velké říjnové revoluce: Velké rozšíření esperantských poštovních známek, které vydal Sovětský svaz, potvrzuje význam Esperanta, jež je u nás velmi váženo jakožto prostředek, sloužící k racionálnějšímu dorozumívání mezi národy. Esperanto, jemuž se možno snadno naučit, pomůže zajisté obeznámit svět o úlohách mírového budování SSSR.

JUGOSLAVIA TURISMA ESPERANTO-GAZETO „KONTAKTO“.

Tiu ĉi bela kaj riĉe ilustrita gazeto estas abonebla. Abonprezo 10 Kĉs jare. Abonojn kolektas s-ano Miloš Rudolf, Wanklova 14, Olomouc.

JULES VERNE – AMIKO DE ESPERANTO. La fama Jules Verne estis konvinkita amiko de Esperanto kaj ripete pruvis siajn simpatiojn al nia lingvo. Li fervere akceptis en 1903 la proponon esti honora prezidanto de tiam fondita Esperantista grupo en Amions. „Brazila Esperantisto en sia n-ro de nov.-dec. 1954, el kiu ni ĉerpas tiujn ĉi informojn, alportas fotokopion de franclingva poŝtkarto de Verne, per kiu li dankis alb razila samideano A. Caetano Coutinho por lia gratulo kaj esprimis la bedaŭron, ke li pro sia alta aĝo ne plu povas lerni Esperanton. Li promesis skribi romanon, en kiu Esperanto ludas gravan rolon. En 1928 s-ino Allote de la Fuye, nepino de Verne, publikigis libron pri la vivo de la fama verkisto. Ŝi diris, ke ŝia avo sin montris adepto de Esperanto, kaj intencis verki libron, dediĉitan al tiu lingvo, ĉar li deklaris, ke „la ŝlosilo de la homa parolo, pepita en la Babela turo, devas esti arte reforĝita“. Bedaŭrinde, Jules Verne mortis post nelonge, en 1905, ne havinte tempon por plene efektivit sian promeson.

EN BRAZILIO komencis aperadi revuo /32paĝoj, ilustrita/ kun titolo portugala- kaj esperant-lingva: PINHEIRAL-PINARBARO. Ĝia subtitolo estas: „Revista Cultural da Juventude de Divulgacao de Esperanto“. La unua numero aperis en novembro 1954. Redaktas ĝin Carlos Geiser, poŝtkesto 1612 Curitiba /Parana/ Brazilo. Li interŝanĝas ankaŭ poŝtmarkojn kaj revuojn.

NOVAĴOJ PRI AŬSTRIA ESPERANTO-POŝTMARKO 1949. En nov.-dec. nro de „The North American Esperanto-Review“ ni legis kelkajn informojn pri la unua aŭstria E-poŝtmarko, kiuj ĝis nun nenie estis troveblaj: 1/ Krom la konata unuataĝo koperto aperis kun tiu ĉi poŝtmarko ankaŭ alia, surhavanta tri vicojn da figuroj en naciaj kostumoj, inter kiuj estas anglalingva/!/ surskribo: ESPERANTO-CONGRESS-VIENNA 1949. 2/ Ekzistas ankaŭ poŝtkarto, sur kiu estas surprisita tiu ĉi poŝtmarko.

ESPERANTO EN ĈEĤA GAZETO. Ĉeĥa revuo por kolektantoj de poŝtmarkoj „Filatelie“ en sia 11/1954 nro devis tamen menciigi aperon de la lasta aŭstria Esperanto-poŝtmarko kaj aldonas ĝian bildon. En nro 19 oni parolas pri tio, ke filatelistan ekspozicion en Opava partoprenis ankaŭ esperantistoj el tiu loko. Kaj en la 23-a nro estis publikigita letero de nia membro dro Jaromír Jermář pri la esperantlingva surskribo en Morse-signoj sur la sovetunia poŝtmarko el 1926. Ni iĝis jam tiel modestaj, ke ni estas kontentaj eĉ pri plej etas mencioj de nia lingvo. Ni esperu, ke ili estas la unuaj hirundoj, kiuj anoncas li bonajn tempojn en baldaŭa estonto. Por la informoj ni dankas al dro Jermář.

ESPERANTO EN „SVOBODNÉ SLOVO“. La ĉeforgano de la ĉeĥoslovaka socialista partio „Svobodné slovo“ alportis la 22-an de majo artikolon pri blindula presejo en Praha kaj diras tie, ke la esperantlingva aldono al la blindula gazeto „Zora“ estas dissendata al 22 landoj. Temas pri „Aŭroro“, pri kiu ni ripete raportis.

ESPERANTO-FLAGO DUM MAJ-FESTO. Dum la unuamaja manifestacio en la pola urbo Vroclav aperis ankaŭ nia Esperanto-flago kun verda stelo. Portis ĝin polaj samideanoj, membroj de Asocio de Esperantistoj en Pollando, filio Vroclav. La flago vokis fortan atenton ĉe la publiko.

DRDA EN ĈINA LINGVO. Alvenis el Peking maja numero de la revuo „I-Ven“ /Tradukita literaturo/, en kiu estas represita du rakontoj – Ĝoja renkontiĝo kaj Abelbredisto- de Jan Drda. Traduko en jinan lingvon estis farita laŭ esperanta teksto.

AL ANDERSEN – FESTO EN ODENSE, kiun partoprenis la tuta kultura mondo por rememori la 150-an naskiĝtagon de tiu granda fabelisto, invitis Estraro de la Andersen-Societo en Kopenhago nian membron Oza Ginz per bela esperantlingva letero.

NE FORGESU RENOVIGI VIAN MEMBRECON DE NIA KLUBO PER PAGO DE LA JARKOTIZO /24 Kčs/ POR NUNA JARO. NUR TIEL VI ANKAŬ REGULE RICEVADOS NIAN BULTENON !

NIAJ INFANOJ VERKOS LIBRON PRI ĈEĤOSLOVAKIO. Ni hodiaŭ denove atentigas pri verkaro de granda signifo, kiun preparas progresema eldonejo japana Heibon-Ŝa en Tokio. En multaj – verŝajne 15 aŭ 16 volumoj aperas priskribo de la tuta mondo, kiel ĝin vidas okuloj de infanoj. La infanoj parolos en ĝi pri sia vivo, ĉirkaŭaĵo kaj pri ĉio, kio ilin interesas. Ili rakontos al siaj malgrandaj japanaj amikoj, ke ili havas similajn ĝojojn kaj dolorojn kiel ili kaj ke ili sincere deziras vivi en paco kun la tuta mondo. Ĉiu bona kontribuado estos bonvena, se ĝin preparos la infanoj memstrare, sen helpo de plenkreskuloj. La verkaĵon povas akompani ilustraĵo /memfarita aŭ foto/, sed aliaj bildoj ne estas necesaj, ĉar la eldonejo ricevis el Ĉeĥoslovakio jam sufiĉan kvanton da desegnoj. Volumo, verkitaj de francaj infanoj, estas jam preta, al Ĉeĥoslovakio estos dediĉita aparta volumo, se kunvenos sufiĉe da kontribuadoj. Instruistoj kaj gepatroj konsideru sia honora devo instigi infanoj al kunlaboro. La infano ricevos la volumon, en kiu ĝia verkaĵo estos represita. Al ĉiu, kiu al ni promesos kunlaboron, ni sendos senpage ĉiujn ĝis nun aperitajn numerojn de speciala revue „La infanoj de la mondo“, ceterajn numerojn post apero. Tie vi trovos ĉiujn necesajn detalojn.

ESPERANTO – REVUOJ, NE PLENUMINTAJ SIAN PROMESON. Ni informas la ĉeĥoslovakajn abonantojn, ke la kvara numero de „Esperantologio“ ankoraŭ ne aperis, kvankam oni anoncis al ni, ke ni ĝin vidos eble antaŭ la Haarlema kongreso. Al la proksimume 800 abonintoj de „El Popola Ĉinio“ ni povas diri, ke la administracio rifuzas liveri la restintajn numerojn. Ĝi ne donis eĉ la promesitan kompenson.

ADRESO DE NIAJ E-GRUPOJ KAJ RONDETOJ ne estas ĉiam fidindaj, kiel ni konstatis laŭ reveno aŭ perdiĝo de niaj sendaĵoj /Bulteno, Heroldo k.s./. Ni petas tial denove kaj urĝe ĉiujn E-organizaĵojn en nia lando, ke ili al ni donu rapide personan adreson de funkciulo, al kiu ni povos niajn sendaĵojn adresi.

JUNULARO VIGLAS. En Most finiĝis kurso de J. Uhlík, kiu instruis 5 infanojn. Ili nun vigle ekkorespondis kun eksterlandano. S-ino Zázvorková instruas 15 gejunulojn. Junularo Mos kunvenas ĉiumarde. Junularo en Praha aranĝas siajn kunvenojn la saman tagon, ĉiun dimanĉon oni ekskursas.

Venonta numero aperos fine de aŭgusto. Kontribuadojn sendu al koresponda adreso de la klubestro: Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha 1.